

The background of the cover is a high-angle photograph of the Great Wall of China winding across lush green mountains. The wall is made of grey stone and brick, with battlements visible. The sky is clear and blue.

fone

(Aprile-Julie, 2007)

语简

**Vizito de ĉina ĉefministro al
Korea Respubliko kaj Japanio**

Startis Ĉina-Rusa Amikeca Vojaĝo en Ĉinio

Vizito al la Granda Muro

Eĥoj pri niaj nova retejo kaj gazetforma Mikrofone

Enkonduko



Tempo flugas! Pasis 3 monatoj kaj nun ni pretigas la novan numeron de **Mikrofone**.

De la ekapero de nia nova **Mikrofone** ni ricevis multajn laŭdojn kaj aplaŭdojn de niaj aŭskultantoj kaj legantoj. Ni ja ĝojas kaj fieras pro viaj pozitivaj eĥoj! Tuj post nia klopodo por la reformo de nia kuriero **Mikrofone** ni faris alian gravan provon kaj kuraĝan paŝon kaj ellanĉis nian retpaĝaron kun nova fizionomio en la 1-a de majo. Ni reordis la riĉfontojn de la malnova reto kaj pluapaŝe raciigis ĝin. La nova retpaĝaro, kun ne malmultaj modernecaj elementoj, tuj akiris gratulojn kaj jesojn de diversalantaj legantoj. Nia nova reto celas liveri utilajn informojn kaj terenon de interfluo por la tutmonda esperantistaro kaj plene elvolvi nian superecon de lingva specialeco, riĉa informeco kaj tiel plu.

En tiuj ĉi 3 monatoj okazis ankaŭ aliaj gravaj eventoj en kaj ekster Ĉinio, kiaj la 3-a Duborda Ekonomia Komerca kaj Kultura Forumo, okazinta en Pekino kaj rigardata kiel grava formo por starigi fiksan platformon de interkomunikado inter la ĉeftero kaj Taiwan; la vizito de ĉina ĉefministro Wen Jiabao al Japanio, vizito titolita Glaci-degeliga Vojaĝo; la grandaskala raportado de 4 radioj kaj televidstacioj pri “Vojaĝo inter Ĉinio kaj la Asocio de Sudorientaziaj Landoj”; kaj Ĉina-Rusa Amikeca Vojaĝo en Ĉinio.

Vi bone scias, ke de la 4-a ĝis 11-a de aŭgusto okazos en Jokohamo de Japanio la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, al kiu nia redakcio sendos 2 raportistojn. Krome, Japana Esperanto-Instituto afable invitis Wang Shanshan, nian junan redaktorinon, al la kongreso. Do por ĉi-jara UK okazonta en nia najbara lando nia redakcio havos idealan teamon, kio ebligos pli rapidan kaj ĝustatempan raportadon pri la UK. Vizitu nian retpaĝaron tiam, kaj vi trovos, ke mi ne fanfaronas! Mi ankaŭ promesas, ke en nia venonta numero de Mikrofone aperos interesaj artikoloj kaj abundaj fotoj pri la Universala Kongreso en Jokohamo.

Do, ĝis la venonta numero!

Amike via,

Jianping Zhao

Okazis la 3-a Duborda Ekonomia, Komerca kaj Kultura Forumo

En la lasta aprilo okazis en Pekino la 3-a Duborda Ekonomia, Komerca kaj Kultura Forumo, kune organizita de koncernaj institucioj de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Kuomintango.




La Forumo estas okazigita laŭ la komuna kono atingita de la du partiaj gvidantoj en aprilo de 2005. Ĝi estas grava formo por starigi fiksan platformon de interkomunikado inter la du partioj. Same kiel la antaŭaj dufojaj forumoj, ĉi-foja forumo celas kolekti saĝojn de diversaj flankoj kaj diskuti pri diversaj problemoj plej zorgataj de la dubordaj popolanoj. Dum 2 tagoj, pli ol 500 ĉeestantoj el diversaj rondoj vaste interŝanĝis opiniojn pri rekta flugado, interfludo kaj kunlaborado pri edukado inter la du bordoj, turismado de ĉefteraj loĝantoj al Taiwan kaj aliaj temoj por pluaparte akceli la ekonomian kaj kulturen interfludon kaj kunlaboradon inter la du bordoj.

Antaŭ inaŭguro de la Forumo, ĝenerala sekretario

de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Hu Jintao refoje intervidiĝis kun Lian Zhan, honora prezidanto de la Ĉina Kuomintango. Hu Jintao esprimis sian esperon, ke la dubordaj sampatrianoj man-en-mane bremsu la displitan agaĉon de "taiwan-a sendependiĝo" kaj protektu pacon ĉirkaŭ taiwan-a markolo. Hu Jintao diris, ke la disvolviĝado de la dubordaj rilatoj pruvis, ke displitiĝo de la du bordoj estas al ambaŭ flankoj damaĝaj, dum kuniĝo ebligas al ambaŭ gajni multon.

Lian Zhan esperas, ke unue, en tre proksima estonteco la du bordoj faru egalecan dialogadon kun reciproka respekto surbaze de la komuna kono atingita antaŭe, kaj due, plirapidigu la paŝojn de interfludoj inter la du bordoj.



Projekto de la olimpika torĉo kaj itinero de la torĉa stafetado



La 26-an de aprilo en Pekino, la Organiza Komitato de la Pekinaj Olimpikoj publikigis projekton de la olimpika torĉo kaj planitan itineron de la torĉa stafetado.

Projekto de la Olimpika Torĉo venis el la ĉina tradicia desegnaĵo Favaŭspicia Nubo. La torĉo, farita en la formo de paperrulo, longas 72 centimetrojn kaj pezas 985 gramojn.

La stafetado daŭros en 130 tagoj kaj vojaĝos ĉirkaŭ 137 mil kilometrojn. Post la vojaĝo tra 22 alilandaj kaj 113 ĉinaj urboj, la torĉo fine atingos ĉefkonkursejon de Pekinaj Olimpikoj.

Vizito de ĉina ĉefministro al Korea Respubliko kaj Japanio



De la 10-a ĝis la 13-a de aprilo, ĉina ĉefministro Wen Jiabao sukcese faris oficialan viziton al Korea Respubliko kaj Japanio kaj ricevis varman bonvenigon kaj afablan akcepton de la dulandaj registaroj kaj popoloj. Dum la vizito Wen Jiabao renkontiĝis respektive kun la dulandaj gvidantoj kaj faris interparolon kun ili rilate al antaŭenpuŝo de la interrilatoj. Li renkontiĝis ankaŭ kun personoj el partiaj, parlamentaj, komercaj, kulturaj rondoj kaj amikecaj societoj de la du landoj, kaj ĉeestis al aranĝoj

pri Ĉina-Korearespublika Interflua Jaro kaj Ĉina-Japana Kultura kaj Sporta Interflua Jaro. Wen Jiabao faris gravan prelegon en la japana Dieto kaj aliaj lokoj. Li kontaktis ordinarajn popolamasojn de la du landoj kaj sincere interparolis kun ili. La vizito akiris pozitivajn kaj gravajn fruktojn.

Aparte menciindas, ke la unufoja vizito de la ĉina ĉefministro al Japanio post la interrompiĝo de reciprokaj vizitoj fare de la altatavolaj gvidantoj de Ĉinio kaj Japanio antaŭ 5 jaroj. En la



pasinta jaro, enoficiĝante kiel japana ĉefministro, Abe Shinzo unue vizitis Ĉinion kaj atingis komunan konon kun ĉina ĉefministro Wen Jiabao, ke la jaro 2007, la 35-a datreveno de normaligo de la diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio, estu "Ĉina-japana Kultura kaj Sporta Interflua Jaro". Wen Jiabao nomas la viziton de Abe Shinzo al Ĉinio Glacidispeciga Vojaĝo kaj nomas sian ĉi-fojan viziton al Japanio Glaci-degeliga Vojaĝo.

Solene okazis ceremonio celebra al dekjariĝo de reveno de HK al patrolando

En la 1-a de julio en hongkong-a centro por kunveno kaj ekspozicio, solene okazis ceremonio celebra al dekjariĝo de reveno de Hongkong al patrolando kaj enoficiĝa ceremonio de la 3a-sesia registaro de Hongkong-a Speciala Administra Regiono.



Ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, ŝtata prezidanto kaj prezidanto de la Centra Militafera Domisiono Hu Jintao ĉeestis al la ceremonio kaj faris gravan parolon.

Hu Jintao montris, ke se personoj el hongkong-aj diversaj rondoj ĉiam prenas kompletajn kaj longdaŭrajn interesojn de Hongkong kiel la ĉefan celon, rigardas ŝtatajn interesojn kiel la gravan, racie faras interfluan, serĉas komunaĵojn dum rezervo de diferencoj, ili certe senĉese akcelas ekonomian kaj socian disvolviĝon kaj kune ĝuos frukton de la disvolviĝo.

Hu Jintao reasertis, ke la ĉina centra registaro plue senŝanceliĝe efektigos kaj praktikos orientilojn pri "unu lando kun du socisistemoj", "regado de Hongkong fare de hongkong-anoj" kaj "alta aŭtonomeco", serioze agados laŭ baza leĝo de Hongkong-a Speciala Administra Regiono, tutforte subtenos laŭleĝan plenumadon de administra ĉefo kaj registaro de la

speciala administra regiono, tutforte subtenos hongkong-an ekonomian evoluon, plibonigon de la popola vivo kaj demokratian antaŭenpuŝon, kaj tutforte akcelos interfluan kaj kunlaboron inter la ĉina interna loko kaj Hongkong kaj aktive subtenos kontakton de la speciala administra regiono kun la ekstera mondo.

En tiutaga ceremonio, administra ĉefo sinjoro Zeng Yinquan kaj ĉefaj oficistoj de la 3a-sesia registaro kaj membroj de administra asembleo de la Hongkong-a Speciala Administra Regiono respektive ĵuris enoficiĝon.



Komuna raportado pri Vojaĝo inter Ĉinio kaj Asocio de Sud-Orient-Aziaj Landoj



Antaŭtagmeze de la 24-a de aprilo, en la urbo Pingxiang de Guangxi, suda Ĉinio, oficiale startis grandskala radia kaj televida raportado pri "Vojaĝo inter Ĉinio kaj Asocio de Sud-Orient-Aziaj Landoj". La teamo el raportistoj de kvar radioj kaj televidstacioj ekiris sur la vojon al la dek membroj de la asocio. La raportado daŭris 50 tagojn en dudekmil-kilometra vojaĝo.

En salvpafado ekveturis la raportista teamo por la vojaĝo pri kunlaboro inter Ĉinio kaj la Asocio de Sud-Orient-Aziaj Landoj. La raportistoj iris tra 35 urboj de la 10 membroj de la asocio: Vjetnamio, Kambogo, Laoso, Tajlando, Birmo, Malajzio, Singapuro, Indonezio, Brunejo kaj Filipinoj, intervjuis al diversrondaj personoj en la socio de la asocio kaj vaste raportis pri la landoj de la asocio.

La 10-a de junio, la teamo jam finis la raportadon kaj revenis al Pekino.



Startis Ĉina-Rusa Amikeca Vojaĝo en Ĉinio



Antaŭtagmeze de la 25-a de majo, sur la placo Tian'anmen de Pekino, pli ol 40 raportistoj de kuna raportista grupo de Ĉina-Rusa Amikeca Vojaĝo estis pretaj por marŝi. Ili venis el rusa novaĝ-agentejo ITAR-TASS, Radia Voĉo de Rusio kaj aliaj sume 12 rusaj ĉefaj amaskomunikiloj kaj 4 ĉinaj centraj amaskomunikiloj. Ili vojaĝos tra 15 ĉinaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj; ĉiuflanke raportos pri ĉinaj ekonomio kaj socio, tradicia amikeco kun Rusio kaj nuna kunlabora situacio. Estro de ĉina Ŝtata Administracio de Radio, Televido kaj Filmo Wang Taihua, rusa ambasadoro en Ĉinio Sergei Razov kaj pli ol 200 diversrondaj personoj de Ĉinio kaj Rusio kune

ĉeestis al la ceremonio.

En 2006 Ĉina Radio Internacia kaj rusa novaĝ-agentejo ITAR-TASS kune projektis kaj organizis la grandan translandan raportadon "Ĉina-Rusa Amikeca Vojaĝo en Rusio". Pri ĉifoja vojaĝo en Ĉinio, direktoro de Ĉina Radio Internacia Wang Gengnian esprimis:

"Oni povas imagi, ke Ĉina-Rusa Amikeca Vojaĝo en Ĉinio lanĉos novan 'rusan varmon' kaj 'ĉinan varmon' en ĉinaj kaj rusaj amaskomunikiloj. Mi kredas, ke la aktivado fariĝos alia ekzemplo de amika kunlaboro inter la dulandaj amaskomunikiloj kaj estos unu el la plej viglaj aktivadoj de 'Ŝtata Jaro' de Ĉinio."





La Granda Muro

Pri la Granda Muro de Ĉinio, multaj homoj jam aŭdis aŭ legis, iuj eĉ jam ĝin vizitis, sed malmultaj homoj scias, ke ĝi estas surtera konstruaĵo videbla de sur la luno. Same kiel la piramidoj de Egiptio, la Taĝ-Mahalo de Hindio kaj la pendĝardenoj de Babilono, la Granda Muro de Ĉinio estas unu el la kvar mirindaĵoj de la mondo.

La Granda Muro serpentumas laŭ la eĝoj de la montĉenoj Yanshan kaj Yinshan, kiuj etendiĝas tra norda Ĉinio de la oriento ĝis la okcidento. Ĉinoj nomas ĝin Dekmil-lia Longa Murego (en la ĉina lingvo, “li” estas longeca unuo egala al duona kilometro). Fakte ĝi longas je dek du mil lioj aŭ 6 000 kilometroj, de la pasejo Jiayuguan en la provinco Gansu ĉe la okcidenta fino ĝis la pasejo Shanhaiguan ĉe la bordo de la maro Bohai en la orienta fino, trapasante kvin provincojn, nome Gansu, Shenxi, Shanxi, Hebei kaj Liaoning, kaj du aŭtonomajn regionojn, nome la Ningxi-a Hui-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

La konstruado de la Granda Muro startis en la 5-a jarcento antaŭ nia erao, en la periodo de Militantaj Regnoj, kiam multaj relative grandaj urboj jam konstruiĝis en la Centra Ĉinio. Tiujn urbojn ofte prirabis la nomadaj triboj, kiuj loĝis norde de la montaroj Yanshan kaj Yinshan. Estante lertaj arkpafistoj kaj rajdistoj, ili atakis kaj forkuris kiel vento. La batal-linioj de la rezistantaj piedsoldatoj rapide frakasiĝis. Por forbari tiujn invadantojn, la regnoj Yan, Zhao, Wei kaj Qin konstruis muregojn laŭlonge de la monteĝoj. En la 3-a jarcento antaŭ nia erao, kiam la unua imperiestro de la dinastio Qin sukcese venkis ĉiujn aliajn ses regnoj kaj fariĝis la unua imperiestro de la unuigita lando de Ĉinio, li

ordonis sian generalon Meng Tian kunigi la muregojn kaj ilin etendigi. Tricent mil soldatoj kaj kamparanoj plenumis la taskon, tiel ke finfine formiĝis kontinua murego. Oni faris la plifirmigon kaj renovigon en la sekvantaj dinastioj. En la dinastio Ming de la 14-a jarcento ĝis la 17-a, la Granda Muro 18-foje ricevis grandskalajn riparojn.

Laŭlonge de la Granda Muro situas 14 grandaj strategiaj pasejoj, kaj la plej gravaj estas la pasejo Shanhaiguan kaj la pasejo Jiayuguan respektive ĉe la du finoj.

La pasejo Shanhaiguan troviĝas inter du apikaj krutaĵoj de la montaro Yanshan, rigardante al la blua maro Bohai. La pasejo kunigas nordan Ĉinion al la nordorienta, kaj estas ŝlosila punkto ĉiam celata de strategiistoj. Tie okazis multaj famaj bataloj historie. La grandioza kvadrata pasejo havas kvar pordegojn unu ĉe ĉiu flanko. Sub la tegmentorando de la duetaĝa orienta pordegturo pendas horizontara ŝildo kun grandegaj ideogramoj: “La Unua Pasejo Sub la Ĉielo”, indikante, ke ĉi tie estas la komenca punkto de la Granda Muro. Sur la pordegturo sidas feraj paflegoj instalitaj en la dinastio Ming antaŭ pli ol tri cent jaroj. Norde de la pasejo ankoraŭ videblas ruinoj de satelitaj gvatturoj, citadeloj kaj kazernoj. Ili formis la unuan kaj duan defend-liniojn. Estis ĝuste la pordego de la pasejo Shanhaiguan, kiun la Ming-dinastia generalo Wu Sanguī malfermis al la manĉura armeo por subpremi la kamaranan ribelon gvidatan de Li Zicheng kaj tiel kapitulacigis la tutan imperion.

En la jaro 1987, Unesko enlistigis la Grandan Muron de Ĉinio en la Katalogon de la Mondaj Kulturaj kaj Naturaj Heredaĵoj.



LA GRANDA MURO

JULIUS BALBIN

La verda stelo fiere surgrimpas
la plej altan supron de la Granda Muro,
laŭ kiu serpentumas dumejllonga amaso
da mondlingvanoj, venintaj el la tuta mondo,
celebri en ĝojo, feliĉo kaj entuziasmo.

En la nevidebla lontano
malantaŭ la murego
ankoraŭ galopas imaginaraj mongoloj
sur siaj etaj ĉevaloj, kies hufoj
sublevas nubojn da sableroj.
La sabloza aero de Pekino
strangolas nin per astmo —
nin, la pacajn batalantojn,
alvenintajn ĉi-tie
el la kvin anguloj de l' mondo
por partopreni la ĉiujaran
lingvoĵamboreon
de interkompreniĝo kaj malmilito.

Kaj jen ni ĉiuj alsuprenis tiun
Grandan Muron, la solan homkreitan
objekton, kiun la astronautoj
kapablis vidi el la luno
trans la senfina ekstera spaco.

Kaj nun, trans la spaco de jarcentoj,
mi ekvidas la galopantajn mongolojn,
tiujn senkomparajn rajdantojn
kaj arkpafistojn, provantajn invadi
la pacamajn loĝantojn de Hanlando.
Kaj mi povas konstati kiel iliaj
fortoj frakasigas kontraŭ
la fortikaĵoj de tiu unika
Granda Muro.

Dum ni parolas kaj kantas
ridas kaj fotas, tuta Pekino
ŝajnas ekrajdi sur bicikloj.
La loĝantoj de ĉi tiu
grandioza urbo, tiel riĉa
je palacoj, temploj, muzeoj
kaj maŭzoleoj ŝajnas esti
same kunkreskintaj kun
siaj bicikloj, kiel la
mongoloj kun siaj ĉevaloj.
Ili biciklas kaj biciklas
senĉese, kvazaŭ ili dezirus
forbicikli for de sia urbo
al iu pli bona, pli bela
kaj pli justa metropolo
de l' imaginara estonteco.

Resumo pri Konkurso

“Sichuan – Hejmloko de Granda Pando”

Karaj legantoj! Finiĝis la Konkurso “Sichuan – Hejmloko de Granda Pando”. Ni tre ĝojas, ke dank’ al partopreno en la Konkurso, la partoprenantoj havas pli profundan konon pri la provinco kaj vekis fortan intereson persone vojaĝi al Ĉinio por viziti la famajn pitoreskejojn, precipe tiujn, kiuj estis enlistigitaj de Unesko en la katalogo de Mondaj Naturaj Heredaĵoj.

En la Konkurso, Ĉina Radio Internacia ricevis preskaŭ sepcent milojn da kontribuaĵoj el 142 landoj kaj regionoj. Post juĝado 11 aŭskultantoj el 11 landoj gajnis specialan premion kaj senpage vojaĝos unusemajne al la hejmloko de granda pando kaj persone spertos la naturajn pejzaĝojn de la provinco Sichuan.

En ĉi-foja Konkurso E-Redakcio ricevis 44 kontribuaĵojn el Armenio, Belgio, Brazilo, Ĉeĥio, Francio, Japanio, Jordanio, Kanado, Korea Respubliko, Rumanio, Venezuelo kaj aliaj sume 21 landoj. Kvankam la nombro de partoprenintoj ne estas granda, tamen aparte ĝojiga estas la kvalito de la kontribuaĵoj. Preskaŭ triono de la kontribuaĵoj estas plurpaĝaj. Tio signifas, ke la respondoj estas sufiĉe detalaj kaj ampleksaj kaj kelkaj kontribuaĵoj eĉ havas fotojn koncernajn al ĉiuj demandoj. Se vi foliumos la kontribuaĵojn, vi havos ĝeneralan konon pri la provinco. Rimarkeble, ke ĉiuj partoprenintoj faris multe da klopodoj por plenumi la respondojn. Estas kortuŝe, ke inter la partoprenintoj ne malmultaj estas grandaĝuloj, kiuj venkis malsanon, malbonan vidpovon kaj aliajn neimageblajn maloportunojn. Ekzemple, 80-jara s-ino Alice Amalia Klein el Brazilo estas unu el tiuj. Ŝi skribis en sia letero: “Elkore mi dankas ĈRI kaj vin ĉiujn. Lastatempe mi ege malsaniĝis kaj eĉ dum dek tagoj mi ne povis moviĝi. Pro kaptuniĝo mi ne povas aŭskulti vian elsendon kaj tial helpe de reto mia filino plenumis la respondojn de la Konkurso.” Okaze de la 80-a jariĝo de Alice Amalia Klein, ni esprimas nian varman antaŭgratulon kaj deziras al ŝi sanon, ĝojon kaj feliĉon! Ni kore dankas ĉiujn grandaĝajn partoprenintojn.

La bona kvalito de la kontribuaĵoj kaŭzis malfacilojn en nia juĝado pri premioj. Kiel ekzemple,

Livia Barth el Argentino, Albert Reiner el Aŭstrio, Jindrich Tomišek el Ĉeĥio, Boris Arrate Veranes el Hungario, Ivan Budinov el Bulgario kaj Komori Yoshiki el Japanio, ĉiuj senescepte ĝuste kaj komplekse plenumis la respondojn kaj devas esti premiitaj. Ni petas pardonon de ili pro nombrolimigo de premiitoj, ĉar ni devas elekti nur ses. Ni bone scias, ke ĉiuj partoprenintoj ne alte taksas premiogajnon, sed nur celas pli bone koni Ĉinion per la partopreno en la Konkurso.

Nun ni proklamu la nomliston de premiitoj:

Gajninto de la unua premio:

Josef Kriz el Ĉeĥio

Gajnintoj de la dua premio:

Loginov Nicolay el Rusio

Edeltraut Henning el Germanio

Gajnintoj de la tria premio:

Marcia Alice Klein el Brazilo

Istvan Barkanyi el Hungario

Urszula Makrzycka el Pollando

Varman gratulon al la premiitoj kaj koran dankon al ĉiuj partoprenintoj!





Kunveno ĉe la Esperanto-Bosko

La 14-an de aprilo, 2007, membroj de la Pekina Esperanto-Asocio (PEA) akvumis arbojn de Esperanto-Bosko en Chaoyang-parko en Pekino. Esperanto-Bosko estas konstruita dum la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en 2004. Antaŭtagmeze, pli ol 40 esperantistoj venis al Esperanto-Bosko kaj komencis akvumi la arbojn. Inter ili estis maljunuloj de pli ol 70 jaroj, studentoj de universitatoj kaj iliaj instruistoj, infanoj kaj iliaj gepatroj.



E-kurso funkcias en la Pekina Normala Universitato



De la pasinta semestro Esperanto-kurso funkcias posttagmeze de vendredo en la Pekina Normala Universitato (PNU). Ĝi funkcias kiel fakultativa leciono por studentoj. La kurso kun pli ol 40 studentoj en tiu ĉi semestro estas gvidata de Zhou Liuxi, profesoro de PNU kaj vicestro de la Instituto de Fremdlandaj Lingvoj kaj Literaturo sub tiu ĉi universitato. Inter la studentoj estas Lee Sun-kyung, filino de Lee Young-koo, prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio. Lee Sun-kyung nun lernas la ĉinan lingvon en tiu ĉi universitato.

La studentoj akiros 2 lernopontojn se ili trapasos ekzamenon. La lernolibro estas "Moderna Esperanto" kompilita de Li Weilun, prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj vicprofesoro de la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato.

Esperanta voĉo venis el la budhisma templo Duobao

La 15-an de majo, usona esperantisto Dennis komencis instrui Esperanton en la budhisma templo Duobao en Zhejiang-provinco en orienta Ĉinio. La kurson partoprenis ĉ. 30 lernantoj inkluzive de bonzoj kaj ordinaraj nereliguloj. Dennis instruis ilin per sia metodo Baza Esperanta Kurso (BEK) kaj sia lernolibro. En la E-instruado partoprenis ankaŭ aliaj esperantistoj, inkluzive de franca esperantisto Michell. La kurso daŭris 15 tagojn.



E-kurso en Guangzhou, urbo de suda Ĉinio



Lastatempe, Augusto Casquero, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, instruis Esperanton kaj la hispanan lingvon en Guangzhou, ĉefurbo de Guangdong-provinco en suda Ĉinio. La kurson partoprenis dudek studentoj el kelkaj universitatoj, kaj ili uzas la lernolibron "Junulkurso", kiu estas alportita de Augusto Casquero de Hispanio.

La 26-an de majo li donis la duan lecionon al siaj lernantoj. Jen fotoj de Augusto kun liaj lernantoj kaj amikoj en Guangzhou.

Cititaj Leteroj – 海外飞鸿

Elektitaj invititoj al la Jokohama UK en Japanio

Hori Yasuo, prezidanto de Invitkomitato de Japana E-Instituto skribis: “En ĉi-jara aŭgusto, okazos la 92-a UK en Jokohamo, Japanio. Kiam okazis la 50-a UK en Tokio en 1965, preskaŭ neniu aziano partoprenis. Kiom multe partoprenos en la Kongreso el aziaj landoj estas unu kriterio, por kiu oni taksos tiun ĉi UK sukcesa aŭ ne. Por ke la Jokohama UK vere estu UK Azia, Japana Esperanto-Instituto lanĉis projekton inviti aktivuloj-esperantistojn el aziaj landoj al la Kongreso.”

Inter la pli ol 20 invititoj el pli ol 10 landoj estas kvin ĉinoj: Redaktoro de E-Redakcio de Ĉina Radio Internacia Wang Shanshan, doganisto Song Jingquan, altranga inĝeniero Wu Guojiang, instruisto Xiong Linping pri la ĉina lingvo kaj sekretario de Zaozhuang-a E-Asocio Zhang Yan. Krome invititoj Hazairin Junep el Indonezio kaj Mohamad Reza Torabi el Irano estas niaj aŭskultantoj. Ni kore dankas s-ron Hori Yasuo kaj la Invitkomitaton de JEI kaj antaŭdeziras plenan sukceson al la Kongreso!

Ni opinias, ke tio estas unu el la efikaj rimedoj kun profunda signifo por akceli la E-Movadon en Azio. Ni ĝojas, ke iuj E-organizoj kaj



eminentaj esperantistoj de Japanio, kiel Esperanto-Populariga Asocio de Oomoto kaj samideano Miyoshi Etsuo kaj aliaj, diversrimede subtenas nian Movadon.

Esperanto en Azio

La 40-a Konferenco de ILEI okazos en Ranzan, Japanio

La 40-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazos de la 11-a ĝis la 19-a de aŭgusto, 2007, en japana urbo Ranzan. La temo de la Konferenco: “Virinoj en Esperanto-kulturo”. Per la Konferenco ĉiuj partoprenantoj povos bone de proksime koni kulturon de Japanio, la lando de krizantemoj.

Bulteno de KAEM

Nepala instruisto en la Esperanto-urbo - Herzberg

Dank’ al Germana Esperanto-Asocio kaj la nova komisiito por

rondvojaĝoj, Lars Sözüer el Duisburg, estis sukcese organizita rondvojaĝo de nepala Esperanto-instruisto post la Printempa Semajno Internacia en Bonn. La aktiva Esperanto-instruisto kaj sekretario de Nepala Esperanto-Asocio Bharat Kumar Ghimire el Katmanduo ankaŭ restadis en la nova Esperanto-urbo Herzberg, vizitis lokan gimnazion kaj la priesperantan ekspozicion en la urba biblioteko, prelegis entute kvarfoje sub la temo “Nepalo - krono de la mondo” kaj la tiea Esperanto-Movado.



Vizito en loka gimnazio

La regiona gazetaro de Germanio antaŭanoncis la prelegon kaj poste denove raportis pri ĝi.

Vin atendas Katalunio, Hispanio

Ĉiam viglas esperantisto-aktivuloj kaj abundas E-aranĝoj en la Kultura Asocio Esperantista en Katalunio,


Hispanio. Ĉi-jare, sub aŭspicio de Hispana Esperanto-Muzeo, la Asocio okazigos la 15-an Internacian Esperanto-Semajnon de Kulturo kaj Turismo en la urbo Tossa de Mar de la 29-a de septembro ĝis la 6-a de oktobro, 2007.

La Organiza Komitato de la Semajno decidis starigi ĉifoje la Premion je la nomo de Ada Sikorska Fighiera, destinatan al esperantisto, kiu akiris meriton en la laboro por Esperanto. La Premio celas publike agnoski gravan kaj sindediĉan laboron por la bela ideo de Esperantismo, faritan de meritplena esperantisto en kiu ajn loko de la mondo. S-ino Ada Sikorska Fighiera siatempe konstante laboris por Esperanto, eldonante sinsekve en Bruselo, Madrido kaj Torino dum 34 jaroj la tiaman gazeton <Heroldo de Esperanto>. La Organiza Komitato intencas stimuli la esperantistojn sekvi ŝian noblan ekzemplon je la servo al nia idealo.

Mesaĝo de Gbeglo Koffi el Togolando:

Finfine funkcias la Asocio Sennacieca de Esperantistoj-Laboristoj en Togolando. Ĝi estas la unua asocio de Esperantistoj-Laboristoj en Afriko. La unuaj membroj estas laborantoj de la Instituto Zamenhof. Per la Asocio la esperantistoj-laborantoj en Togolando celas vivigi veran solidaron inter esperantistoj-laborantoj en Togolando kaj disvastigi Esperanton per propraj rimedoj.

Aprecu fotojn de Luit Staghouwer el Nederlando



S-ro Luit Staghouwer estas amatora fotisto kaj ofte turisme vojaĝas eksteren kun sia edzino. Ĝuante bonajn pejzaĝojn, li ĉiam preterlasas ŝancon por fari valorajn fotojn. Antaŭ nelonge li sendis al ni kelkajn fotojn kaj ni

elektis al du el ili por kuna apreco. En tiuj du fotoj, ni povas facile rimarki, ke la fotisto havas ne nur bonkvalitan aparaton, sed ankaŭ altan fotografion. Dankon al s-ro Luit Staghouwer!

Ne nur merlo, ĝenerale ĉiuj birdoj estas singardemaj kaj oni malfacile povas al ili proksimiĝi. Sed nia amiko, sperta Luit Staghouwer, kaptis la bonŝancon. Sinkaŝinte malantaŭ dika arbo, li malrapide nerimarkite proksimiĝis al la merlo. Feliĉe, la merlo ne moviĝis kaj nur atente lin rigardis, sekve li surventre rampis pli proksimen kaj singardeme forigis kelkajn herbidojn inter si kaj la merlo kaj finfine sukcesis foti ĝin je la distanco de nur iom pli ol unu metro.



Ankaŭ libelo estas tre singardema insekto, sed nia fotisto ankaŭ sukcesis. Laŭ lia supozo, la libelo kaptis insekton kaj absorbiĝe formangas la viktimon, ĉar li aŭdis la maĉadon de la libelo. Gratulon!

Karaj legantoj, ni kredas, ke interniaj legantoj ne mankas amatoraj fotistoj. Se vi havas valorajn fotojn, bonvole sendu ilin al ni por komuna apreco. Ni vin dankas anticipe.

Letero de Arja Kuhanen el Finnlando:

Elkoran dankon pro via fervora laboro por tuta esperantistaro! Mi ege admiras vian entuziasmon kaj talenton. Post nuligo de la E-elsendoj de Pola Radio via laboro estas nemezureble valora. Mi ege deziras al vi forton por diligente labori. Memoru, ke vi havas multajn geamikojn ĉi tie en Finnlando.

Letero de Jiri Patera el Ĉeĥio:

Mi estas tre surprizita vidante, ke la revuo havas denove novan formaton. Ĝi estas malpli granda ol kutime, sed kun pli multe da paĝoj, tial ĝi memorigas al mi la iaman tre belan kaj valoran revuon "El Popola Ĉinio".

Estas por mi granda surprizo, ke Mikrofone eniras en sian kvinan jaron de aperado. Dum tiu tempo ĝi jam fariĝis mia kutima akompananto de viaj perondaj elsendoj. Kaj nun mi vidas, ke ĝi verŝajne estos ankoraŭ pli bela kaj pli enhavoriĉa, kion konfirmas la nombro de paĝoj. Mi kredas, ke ĝi estos digna postsekvanto de El Popola Ĉinio, se ĝi ne ŝanĝos denove sian formaton.

Kune kun la letero, estis ankaŭ bela bondezirkarto, desegnita de klubanino Pavla Zemanova, kun subskribo de multaj samideanoj de Praga Esperantista Klubo. Ni kore dankas ĉiujn pro la bondeziroj al ni kaj al tuta ĉina popolo.

La 9-a Tago de Pioniro - Omaĝo al Elpin AN U-seng

La 12-an de majo ĉi-jare, okazis en Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj okazis la 9-a Tago de Pioniro de Korea E-Asocio. Ĉi-jare oni omaĝis al la pioniro Elpin AN U-seng (1907-1991) per eldono de memorlibro <La Literatura Mondo de Elpin>, verkita de Lee Young-Koo. En la festo ĉeestis preskaŭ 70 partoprenintoj. Pioniro Elpin, kiel patrioto kontraŭ japana kolonia regado de Koreio, ĉefe aktivis en Ĉinio. Li lernis kaj instruis Esperanton en la Universitato Zhongshan, Ĉinio; tradukis en Esperanton la ĉinan novelon "Taglibro de Frenezulo" de Lusin.

Korea E-Asocio festas la Tagon de Pioniro unutage en majo de ĉiu jaro. La eventon iniciatis d-ro Lee Chong-yoeng en 1999 por memori la kontribuojn de la forpasintaj pioniroj.

Kim Uson, ĉefredaktorino de La Lanterno Azia.

Informo de Daniel Bebelacqua el Brazilo:

Laŭ informo de Daniel Bebelacqua, kunrespondeculo pri Radio Aktiva, de la 8-a ĝis la 13-a de julio okazos en Rio-de-Janeiro, Brazilo, la 42-a jubilea kongreso de Brazilo, okaze de la 100-jariĝo de Brazila E-Ligo.

Dum la tuta semajno oni povos sekvi la plej gravajn eventojn de la kongreso pere de la elsendoj de "Radio Aktiva". Paralele okazos ankaŭ la 27-a Junulara Kongreso kaj la 6-a Infana Kongreseto.

Eĥoj pri niaj nova retejo kaj gazetforma Mikrofone

Karaj legantoj, post preskaŭ duon-jara preparado kaj projektado finfine funkcias nia nova retejo kun pli riĉa enhavo kaj nove desegnitaj kanaloj. La nova retejo estas pli racia kaj oportuna al retumantoj. Preskaŭ samtempe aperis nia gazetforma Mikrofone tenata nun en la manoj de niaj legantoj. Tiuj du gravaj aferoj signifas alian grandan progreson de la E-elsendo kaj portis surprizon kaj ĝojon al niaj legantoj. Lastatempe sinsekve venis al ni leteroj kaj mesaĝoj, en kiuj niaj legantoj el diversaj landoj esprimis gratulojn kaj jesojn pri nia laboro.

S-ro Albert Reiner el Aŭstrio:

Kvankam mi ne plu povas aŭskulti viajn elsendojn tiel regule kiel antaŭe, mi tamen ne forgesas vin kaj provas ne tute perdi la kontakton kun la esperantlingvaj elsendoj de Ĉina Radio Internacia. Apartan rolon en tiu laŭnature havas kaj via retpaĝo kaj la aŭskultantomagazino 'Mikrofone'. Kaj kia miro: ambaŭ ĉi tiuj ligiloj inter Ĉinio kaj la mondo esperantista radikale renoviĝis je preskaŭ sama tempo. Mi senrezerve konstatis, ke vere estas granda plibonigo.

Certe vi jam ricevis multajn pozitivegajn reagojn al ĉi tiuj fruktoj de via laboro, kaj ankaŭ mi volas enviciĝi en la gratulantaron. Eĉ pli gravaj por mi (ĉar ĝenerale mi preferas legi paperon anstataŭ ekranon) estas la plibonigoj de 'Mikrofone', precipe ĝiaj pliampleksigo kaj enhava pliriĉigo.

S-ro Martin Stuppniĝ el Aŭstrio:

Bonorde mi ricevis vian belaspektan kaj eĉ iom pli ampleksan 17-an Mikrofone - dankegon kaj gratulon! Estas taŭga ekzemplero, per kiu oni povas samokaze reklami ankaŭ nian E-movadon!

S-ro Leopold Patek el Aŭstrio:

Hodiaŭ mi rigardis la unuan fojon vian novan retejon, kiu ege plaĉas al mi. Gratulon! Ankaŭ hodiaŭ mi ricevis la revuon 'Mikrofone' n-ro 17, kiu nun havas 14 paĝojn. Denove kaŭzo por gratuli!

S-ro Jean Pierre Vandendaele el Belgio:

Mi legis nian novaspektan Mikrofone en trajno. Liaopinie, la nuna Mikrofone vere estas bela, precipe la artikolo pri vizito al Imperiestra Palaco plaĉas al li.

S-ro Jiri Patera el Ĉeĥio :

Mi estas tre surprizita vidante, ke la revuo havas novan formaton pli belan kaj pli enhavoriĉan. Ĝi memorigis al li iaman belan kaj valoran "El Popola Ĉinio". Estas por li pli granda surprizo, ke Mikrorone iam eniras en sian kvinan jaron de aperado, dum tiu tempo ĝi jam fariĝis lia kutima akompananto de niaj perondaj elsendoj.

Kune kun la letero, estis ankaŭ memfarita bela bondezirkarto de klubanino Pavla Zemanova kun subskribo de multaj samideanoj de la Praga Esperantista Klubo. Ni kore dankas ĉiujn pro la bondeziroj al ni kaj al la tuta ĉina popolo.

Nia brazila amiko Sílvia Knies Mates:

Mi ĵus ricevis Mikrofone. Mi gratulas la evoluon de via (nia) informilo."

Ricevinte belan Mikrofone, s-ino Saliko el Finnlando esprimis dankegon! Ŝiaopinie, Mikrofone vere estas prezentinda gazeto.

André Albault el Francio:

Mi persone tre ŝatas la enhavon de Mikrofone, same kiel ĝian modernan aspekton kun multaj ilustraĵoj. Li dankis kaj petis nin plu sendi la eldonaĵon al li. Alia franca amiko Robert Pontnau rekte dankis nin por la interesa kaj tre bele farita gazeto. Li deziras prosperon al nia agado kaj la gazeto dum la jaro 2007.

Alte taksas gazetforman Mikrofone ankaŭ multaj legantoj el Japanio. Masatake Morisima estas 95-jaraĝa, unu el la plej grandaĝaj legantoj. Li esprimis, ke li ege admiras la ŝanĝiĝon kaj tre ŝatas gazetforman Mikrofone. Estas feliĉe, ke li ankoraŭ ne perdis vidkapablon kaj povas tralegi ĉiujn numerojn. Samideano Hideki Harada ĝoje informis, ke al li kaj ankaŭ al Husako bonorde venis "Mikrofone" n-ro 17 kun renovigita belega aspekto en formo de gazeto. La foto de kovrila paĝo pri la Malpermesita Urbo estas impona kaj tiu de dorsa paĝo, la domo de ĈRI rememorigis lin pri nia bela akceptado okaze de Pekina UK. Cetere, ĝia enhavo estas multe pli riĉa kaj abunda. Pro tio li esprimis gratulojn kaj dankon! Li skribis: "Mi intencas prezenti ĉi tiun 'Mikrofone' en nia monata kunsido de Okayama E-Societo. Certe ili deziras aboni ĝin kaj tio helpos pli multigi aŭskultantojn de ĈRI." Alia japana amiko Osaki Hiroshi esprimis gratulon kaj jeson simple per kelkaj vortoj ĉinaj kaj esperantaj en poŝtkarto <Vivu '话筒'-Hua Tong' Mikrofone!>.

Pola samideano Marian Laba:

La nova aspekto de Mikrofone ĝojigis ŝin. Ŝi admiras nian daŭran klopodon por perfektigi kaj plibeligi la skribligilon de ĈRI kun aŭskultantoj. La nova formo de Mikrofone estas pli oportuna ne nur por legado, sed ankaŭ por kolektado. Gratulojn kaj komentojn sendis pola amiko Przemek Grzybowski.

Venezuela aŭskultanto Manuel Ortega sendis al ni sincerajn gratulojn pro nia nova retejo:

Li skribis, ke li tre aprecas la novan belaspektan retejon, ĉar ĝi spegulas altan profesiecon.

Nun daŭre venas similaj leteroj kaj mesaĝoj. Ni ege dankas ĉiujn, kiuj ĉiam senlace subtenas nian laboron kaj alte atentis ĉiujn niajn progresojn. Tio donis al ni ne nur kuraĝigon, sed ankaŭ plenan fidon en estonta laboro. Ni kredas, ke dank' al tiuj konstantaj subtenoj kaj zorgoj, paŝo-post-paŝe realiĝos nia nova laboro-plano kaj senĉese progresos niaj E-elsendo kaj Mikrofone.

Renkonte al la kvin-jariĝo de Mikrofone, nun okazas artikolpeto pri ĝi. Maje venis pli ol 10 kontribuajoj el Germanio, Hungario, Japanio, Litovio kaj Svislando. La titolo de la kontribuado de Kazimiro Krzyżak el Pollando estas “Nur en Ĉinio estas espero disvastigi Esperanton en la mondo”. Ni kredas, ke pri tiu ĉi temo ĉiu el vi havas multe por skribi. Kun la lasta numero de Mikrofone ni sendis al vi afrankitan koverton kaj esperas, ke vi skribu senavare impresonajn kaj kortuŝajn artikolojn kaj rekte sendu ilin al ni. Ni vin dankas anticipe kaj atendas viajn kontribuojn.

Artikolo de Kazimiro Krzyżak el Pollando:

Ĉi-primtempo s-ro Kazimiro Krzyżak aŭskultis belegan prelegon faritan de profesoro T. Palmowski de Gdanska Universitato. La temo de la prelego estas “Ĉinio magia lando”. Post aŭskulto li havis pli profundan konon pri riĉa antikva ĉina kulturo kaj pri rapida progreso kaj granda ŝanĝiĝo de la urboj kaj la kamparo de moderna Ĉinio kaj konstatis, ke Ĉinio fariĝos plej granda potenco de la mondo en pli proksima tempo. Ligante la nuntempan Ĉinion kun la historio de la ĉina E-Movado en la pasintaj cent jaroj, li skribis jenan artikolon omaĝe al la kvinjariĝo de Mikrofone.

Nur en Ĉinio estas espero disvastigi Esperanton en la mondo

Post la unua mond-milito, multe da landoj entuziasme pritaksis Esperanton kaj enkondukis ĝin kie la duan lingvon post la propra-nacia. Kiam tiu ĉi ideo

estis preskaŭ akceptita, Japanio, Francio kaj Anglio sufokis ĝin. Ĉar ĉi tiuj landoj ne volis perdi siajn imperialistajn influojn en la mondo.

Poste la ĉina lingvo estis plivestigata en la mondo preskaŭ trifoje. plimulte da homoj lernis la ĉinan ol la anglan. Kaŭze de la malfacileco de la ĉina lingvo, precipe de la malfacile skribblaj belegaj artistaj ideogramoj, la ĉina lingvo perdis la ŝancon fariĝi universala lingvo. Tiam en Ĉinio kaj ankaŭ en Japanio Esperanto estis alte taksata. Evidente Ĉinio ekvidis la rolon de Esperanto en opono kontraŭ la lingva imperialismo de Eŭropo kaj precipe kontraŭ la diskriminacio de la angla lingvo en la mondo kaj Esperanto estis pli alte taksata.

Kiam aperis Esperanto, ĉina reformisto Kang Youwei konstatis, ke lernado de multe da lingvoj malŝparas valoran tempon kaj elĉerpas mensan energion. Koncerne al malfacileco de la ĉina lingvo, multe da ĉinaj intelektuloj konsideris eblecon adapti ĉinan skribon al pli moderna formo kaj prenis Esperanton kiel modelon. Eĉ elmigrintoj-ĉinoj en Parizo sugestis reformojn kaj postulis enkonduki en Ĉinion Esperanton frue en 1907.

En 1908, ĉina ĵurnalo “Hengbao”, kiel unua en Azio, fariĝis favora al Esperanto. En 1932 Ŝanhaja Esperanto-Ligo publikigis tre altnivelan, Esperantan ĵurnalon “La Mondo”. Sinsekve aperis ankaŭ aliaj Esperantaj gazetoj, kiel ekzemple, “Voĉoj de Oriento”, “Orienta Kuriero”, “La Navaj Tempoj”, “Heroldo de Ĉinio”, kiuj laŭ statistiko havis legantojn en 850 urboj el 63 landoj. Eĉ ĉina prezidanto Mao Zedong faris brilan pozitivan epigrafon favoran al Esperanto: “Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel la formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata.”

Post fondiĝo de la nova Ĉinio, daŭre prosperis la ĉina E-Movado. En 1951 fondiĝis la Ĉina Esperanto-Ligo kaj poste aperis bela monata E-gazeto “El Popola Ĉinio”. Sekve en 1964 Esperanta Redakcio de ĈRI komencis E-elsendon. Ĉio ĉi kontinuigis la ĉinan gloran tradicion disvastigi Esperanton en la tuta mondo. Hodiaŭ E-Redakcio de ĈRI apartenas al unu el la plej

aktivaj E-radioj, kiuj disvastigas Esperanton. Nun ĈRI estas unika en la mondo, kiu ĉiutage havas Esperanto-elsendon kurtonde, rete kaj mezonde. La de ĝi eldonata interesa kaj senĉese plibonigata revuo “Mikrofone” ĝuas famon en la monda esperantistaro kaj efike propagandas Esperanton.

Antaŭ nelonge ĈRI festis sian 65-an datrevenon kaj E-Redakcio solenis 40-jariĝon de sia elsendo. Mi esperas, ke kiam oni jubileos la duan 40-an datrevenon de E-elsendo aŭ la duan 65-an datrevenon de ĈRI, samtempe oni celebros ankaŭ la triumfon de Esperanto en la mondo.



Poemo de ĉina esperantisto Mo Yangsheng :

Legas vin

Dum vin legas - mia kara,
kiel rivereto klara,
plenas de feliĉo en la koro
kun ĝuemo kaj humoro.

Dum vin legas ----mia kara,
kiel luno brile pala,
plenas de espero en la koro
fore de ĉagreno kaj doloro.

Dum vin legas - mia kara,
kiel la spegulo rara,
okupita de kvieto en la koro
kun plezuro kaj aŭroro.

Mikrofone emocia,
antaŭ okulparo mia,
plu belecon mi ankoraŭ trovas,
vin forlasi tute jam ne povas.

Mikronovelo – 微型小说

Riĉiĝo



Ĉiuj volis riĉiĝi. Eĉ Lao Yang. Multaj jam forlasis la vilaĝon por "gajni oron". Sed Lao Yang ne sciis kiel sin riĉiĝi, tial li ne kuraĝis iri eksteren.

Post kelkaj jaroj, vere riĉiĝis plejpartaj el la vilaĝanoj, kiuj iris aliloken. Sekve leviĝis multaj etaĝdomoj, tre belaj, en la vilaĝo. Riĉiĝintaj junuloj alkondukis ĉarmajn edzinojn. En la vivo Lao Yang unuafoje vidis tiel multajn kaj tiom belajn inetojn. Li sentis pikecon en la okuloj. Li ankoraŭ pli deziris riĉiĝon, sed des malpli li ne sciis kiel sin riĉiĝi. Lasinte sian ĉarman edzinon en la hejmo, ĉiu el la riĉiĝintaj vilaĝanoj denove iris eksteren por pli riĉiĝi sin. Lao Yang restis en sia dometo, simila al hunda fekaĵo, kaj eĉ furzon ne kuraĝis pli laŭte elasi.

"Fracĵo Yang!" vokis iu el la riĉiĝintaj junuloj, starante antaŭ lia nesto.

Lao Yang malfermis la pordon kaj suspekto rigardis la vokinton.

"Ni intencas doni al vi salajron." Kaj tiu endomiĝis.

Eĉ pli forta nekredemo.

"Gardu niajn edzinojn! 300 juanojn por ĉiu monato. Sed kondiĉe, ke nenio okazu!"

Lao Yang iom sin movis. "Mi povas bone gardi ilin. Sed monon ne donu!"

"Idioto!" La juna viro metis 600 juanojn sur tablon. "Anticipo por 2 monatoj."

Lao Yang gardis la edzinojn de tiuj riĉuloj, skrupule kaj asidue. Tamen tiuj sinjorinoj tute ne sciis tion, kvankam ili jam rimarkis, ke li observas ilin de nemalproksime kaj paŝas tien kaj reen eĉ vespere.

Sole li, mezaĝulo, restis en la vilaĝo, ĉar ĉiuj junaj kaj mezaĝaj viroj jam eksteriĝis por riĉiĝo. La restado de Lao Yang ja servis kiel spico kontraŭ ilia soleco. Ili do inklinis babilon kun li. Kaj siaflanke li tre ĝojis, ne havante ian pretekston por proksimiĝi al ili. Ili kaptis lin kaj faris el li gagon. Li tuj kantis, kiam ili postulis, ke li kantu; li prompte bojis, kiam ili ordonis, ke li imitu kriojn de hundo. Fine ili ŝovis al li monon, sed li kategorie rifuzis.

"Idioto!" Kaj ili tre koleris.

Li akceptis la monon, kaj ili sufiĉe kontentis kaj gajnis. Poste li ellernis kiel plaĉi al la riĉaj sinjorinoj. Kaj grasiĝis pli kaj pli gratifiko al li.

Kaj pli poste, tia ideo venis al li, ke ili sekvu manieron de urbaninoj – nu, Lao Yang estu "ĉambristino". Kaj li plezure promesis. Li preparis la 3 manĝojn kaj faris mastrumadon por ili. Liaj kuiradoj trafis ilian guston kaj ili alte taksis ĉiun el liaj laboroj kaj servoj. Kaj lia poŝo pufiĝis.

Venis jarfino. Venis la riĉiĝintaj uloj. Vidinte, ke iliaj edzinoj tiom bone vivas, kaj aŭdinte laŭdojn al Lao Yang, ili donis 10-monatan pagon al li kaj eĉ grandan sumon da bakŝiŝo.

"Same en la nova jaro!" Ili decidis dungi plu lin.

Antaŭvespere de la nova jaro, riglante la pordon, Lao Yang metis en terliton ĉiom da mono. Li kaj lia edzino komencis kalkuladojn.

"Ankaŭ mi marŝas sur la vojo de riĉiĝo."

Pan Wenbo





Tra la Mondo – 世界各地

Okazos la 42-a Brazila Kongreso de Esperanto

Rio-de-Ĵaneiro estos la scenejo de 42-a Brazila Kongreso de Esperanto (BKE). La temo de la evento estos Cent jaroj de E-movado en Brazilo: strategioj por la estonto. De la 8-a ĝis la 13-a de julio, homoj el ĉiuj brazilaj ŝtatoj kunsidos en Rio celante pripensi la disvastigadon kaj starigi novajn laborplanojn rilate al la internacia lingvo. Oni atendas pli ol 1 000 partoprenantojn. Dum la kongreso okazos prelegoj, artaj ekspozicioj kaj konkursoj, muzikaj prezentadoj, ekskursoj al turismaj lokoj kaj tiel plu. La 42-a BKE estas aŭspiciata de Brazila Esperanto-Ligo kaj organizata de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro.

Okazos Itala Kongreso de Esperanto en Pisa

Ekde la 31-a de aŭgusto ĝis la 7-a de septembro en Pisa, okazos la 74-a Itala Kongreso de Esperanto. La temo de ĝi estas "Eŭropo: multaj lingvoj por komuna lando". Dum la Kongreso, en la tagoj sabato kaj dimanĉo, okazos eksterordinara sesio de ekzamenoj pri Esperanto, zorge de Itala Esperanto-Instituto.

Japana Esperanto Insituito aktive trejnis volontulojn por UK

De la 3-a ĝis la 5-a de majo okazis la 40-a Esperanto-Seminario (la 39-a Friska Lernejo de Esperanto). Kunorganizita de Japana Esperanto Insituito

kaj Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj, en la urbo Kobo. 82 partoprenantoj lernis la lingvon en 5 klasoj, el kiuj 2 estis por helpantoj kaj turism-gvidantoj en la UK.

Jarlibro 2007 aperis

Portreto de Antoni Grabowski (1857-1921) malfermas la ĉi-jaran Jarlibron de UEA omaĝe al la 150-a datreveno de la granda poeto-tradukisto, kiu grave influis la evoluon de la nova lingvo. La apero de la Jarlibro preskaŭ koincidis kun lia naskiĝtago la 11-an de junio. En la antaŭparolo Renato Corsetti, por la lasta fojo kiel prezidanto de UEA, traktas la rolon de tiu ĉi plej populara Esperanto-libro, al kiu la evoluo de komunikrimedoj nun metas aliajn defiojn ol en la tempo, kiam Hector Hodler redaktis ĝin.

Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoĵ	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: espradio@cri.com.cn

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>



Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.

CRI  **online**
Esperanto

<http://esperanto.cri.cn>

(2007年第二期 总第18期)

Tel: +8610 68891940
+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: espradio@cri.com.cn

Adreso: Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040